

Neniam du sen tria

Temas pri francalingva proverbo.

ILEI preparis kaj lanĉis du programojn por Esperanto Instruista Trejnado EIT (vidu novaĵojn en <http://www.ilei.info/>) :

- Reta Instruista Trejnado de Esperanto (RITE) plus MADRIDO
- Reta Instruista Trejnado de Esperanto (RITE) plus 2 x POZNAN

Nun aperas

- Reta Instruista Trejnado de Esperanto = **RITE plus KOTONUO !**

ILEI ne povas neglekti Afrikon. Jen unua anonco.

Konstato : pluraj ne afrikanoj partoprenis Afrikan Kongreson en Bunda, Tanzanio kaj / aŭ la kongreson de la junuloj IJK en Aneho, Togolando. Ili konstatis kaj emfazis, kiom bone afrikanoj parolas nian lingvon. Pluraj el ili esprimis sian admiron pri tio.

Konstato : legante la anoncon pri du ebloj de Esperanto Instruista Trejnado (EIT) aŭdiĝis voĉoj el Afriko : kiel ni povos partopreni.... ? Fako estas, ke afrikanoj ne ricevas vizon al Eŭropo (Hispanio kaj Pollando membras en la Schengen-zono). Fako estas, ke por ĉiuj la vojaĝo estus ege kosta.

Do ILEI esploris pri solvo, kaj trovis, danke al la preteco de D-ino Katalin Kovats, kiu konsentas sekvi la lernadon retan (RITE) de plia dudeko da ontaj diplomitaj Esperanto-instruistoj. La tria solvo nomiĝas « RITE plus KOTONUO »

Jen prezento de la lertigado, kiu iom similas iom malsimilas al la du aliaj programoj.

La lertigado konsistas el du partoj :

- RITE (reta instruista trejnado kun lernado, taskoj, kontrolo fare de Katalin Kovats kaj Mireille Grosjean). Tiu parto povas tuj komenciĝi. La studentoj devas povi labori proks. 6 – 8 horojn semajne. La fino de ĝi devos okazi ĝis la 30-a de septembro 2018. La kostoj de tiu parto por partoprenantoj loĝantaj en Afriko estas 80 EUR.
- Surloka plensemajna kurso en Kotonuo, Benino, en Hotelo JOCA. Tiu parto estos organizita de la NRO « Scio Sen Bariloj » ; la kurson gvidos Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI. Datoj : 4-11 novembro 2018. Espereble dudeko da personoj aliĝos kaj venos al Kotonuo ĉu per buso ĉu

per aviadilo, depende de sia loĝloko. Espereble plej diversaj afrikanoj povos veni, kaj same afrikemuloj el aliaj mondopartoj.

La diferenco jenas :

La restado en Benino de dimanĉo 4-an de nov. vespermanĝo ĝis dimanĉo 11-an de nov. matenmanĝo estos organizita de « Scio Sen Bariloj ». Tranoktoj kaj po tri manĝoj tage dum plena semajno en hotelo JOCA kostas entute por unu persono 170 EUR.

« Scio Sen Bariloj » SSB klopodos arigi donacojn unue por kovri la ĝeneralajn kostojn de tia organiza laboro (banderolo kaj luo de la kunvenejo) kaj due por subteni la partoprenantojn, kiuj devos mem trovi 80 EUR por la reta kurso, 170 EUR por la forte rabatita restado en Kotonuo (do entute 250 EUR) kaj la vojaĝkostojn.

Por tiuj partoprenantoj de EIT plus MADRIDO kaj de EIT plus 2 x POZNAN la partoprenantoj devas plie mem zorgi pri hotelo kaj manĝoj. Jen la diferenco.

Alvoko al afrikanoj : pripensu pri ŝparado, kolekto de mono ĉe viaj pluamikoj kaj multaj kontaktoj.

Alvoko al norduloj : Bonvole uzu la UEA-konton de SSB assb-k por subteni tiun unuan kaj certe ne unikan eblon por niaj plej elstaraj afrikaj gesamideanoj fariĝi diplomitaj EO-instruistoj ! Vi povas fari tion laŭ du manieroj. Vi povas sendi monon kun indiko : « Por EIT en Kotonuo ; mi volas subteni la personon X aŭ Y ». Vi povas sendi monon por la ĝenerala kaso de EIT en Kotonuo. La organizantoj esploras pri repagistemo cele al motivado de la plej diligentaj gestudentoj.

Evidentiĝas, ke por tiuj partoprenantoj el diversaj afrikaj kaj ne afrikaj landoj ILEI organizos ankaŭ **lingvan ekzamenon « Tria Nivelo » de ILEI UEA**. Do la plej diligentaj kaj bonaj lernantoj akiros du diplomojn okaze de tiu grava evento.

Pri « Scio Sen Bariloj » bv legi https://eo.wikipedia.org/wiki/Scio_Sen_Bariloj
Pri la hotelo kaj kulturcentro JOCA bv legi <https://eo.wikipedia.org/wiki/JOCA>

ILEI kaj edukado.net devos pripensi pri lertigado EIT en Ameriko kaj Azio en 2019.

Mireille Grosjean

Prez. de ILEI

2017-11-21